

Max von Schenkendorf,

## Ho liber', adore

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

1. Ho liber', adore  
 Mi ja amas vin,  
 Mi deziras kore:  
 Venu je la fin'!  
 Ĉu vi venos iam  
 Al ni, la homar' ?  
 Ĉu vi restos ĉiam  
 Inter la stelar' ?

2. Ankaŭ en arbaro,  
 Kie migras mi,  
 Kaj sub rev-floraro  
 Ja troveblas vi.  
 Estas vivo vera,  
 Kiam regas vi  
 Sur la rondo Tera,  
 Tiam ĝojas ni.

3. Kiam alrigardas  
 Ni amike nin,  
 Kiam kisoj ardas,  
 Amas nin knabin'...  
 Sed ne haltas iam  
 Tiu kor-dezir',  
 Al ĉielo ĉiam  
 Strebas la sopir'.

...

Max von Schenkendorf,

## O libertas cara

*tradukita de N. N. 08*

1. O libertas cara,  
 Cui sum deditus,  
 Veni luce clara  
 Velut angelus!  
 Non vis apparere  
 Mundo anxio?  
 Tantum vis lucere  
 In aetherio?

2. Umbra in fagorum,  
 Silva hilara,  
 Sub odore florum  
 Domus est tua.  
 Haec est vira pura,  
 Cum flat, sonitat,  
 Tua si natura  
 In nos penetrat.

3. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

...

4. Venas kanto mia  
 El trankvila land',  
 Bilda idilia  
 Estas mia kant'.  
 Floras flor' ĝardena,  
 Estas multe da  
 Spikoj eĉ en jena  
 Ŝtona mondo ja.

5. Kie Dia flamo  
 Brulas en la kor',  
 Kun fidel' kaj amo  
 Al la propra mor';  
 Kie sin defie  
 Ligas por justec'  
 Kuraĝuloj, tie  
 Regas liberec'.

6. Inter urbaj muroj  
 Povas ŝveli kor'  
 Por preĝejaj turoj,  
 Por prapatra mor',  
 Strebas supren tiam  
 Lumen al altec',  
 Pretas morti, kiam  
 Vokas liberec'.

...

4. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

5. Ubi Dei igne  
 Capta'st antiquae  
 Stirpis quae antiquae  
 Est assecula,  
 Ubi viri degunt,  
 Qui honorem, ius  
 Cum virtute tegunt,  
 Tuti erimus.

6. ....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

...

7. Ho, efektivigu  
 Dia la favor',  
 Plene profundigu  
 En la homa kor'.  
 Ho liber', aminda,  
 Kara estas vi,  
 Ege dezirinda,  
 Venu vi al ni!

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (\*1783 - †1817) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2006-01-29.*

*MR-445-1 / Arg-340-682 (2006-02-01 16:00:35)*

*La kanto estas kantata laŭ la melodio de Karl Groos (1789 - 1861).*

7. Ad nos tu convertas  
 Dei studia,  
 Nobis libens mergas  
 Te in pectora!  
 O libertas suavis,  
 Numen tenerum,  
 Nullum morem mavis  
 Quam Germanicum.

*Traduko de la Germana poemo "Freiheit, die ich meine" de MAX VON SCHENKENDORF (\*1783 - †1817) en la Latinan de N. N. 08.*

*Arg-340-683 (2006-01-29 13:15:23)*